# NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Ekde 1985 redaktas kaj eraras Lupe Sanz

**JULIO-AŬGUSTO 2009**


## 68-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Samtempe kun la 14ª Andaluzia Kongreso de Esperanto okazis en Malago la Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio. Aliĝis preskaŭ 90 gekongresanoj kiuj ricevis la libron “El hombre que desafió a Babel” dank’al la subvencioj de MEL, HEF kaj la kongreso mem.

La programaro estis diversa, kvankam kelkaj pensis ke estis tro da prelegoj kaj malmulte da kulturaj-turismaj eventoj, eble pro la varmega temperaturo kiu ne permesis esti sur la stratoj dum multaj horoj. Malgraŭ tio, la kuraĝaj kongresanoj faris piede la viziton al la urbo kun pli ol 40ºC !

Pedro Sanz deĵoris en la libroservo, kiu montris multajn librojn en la sama salono kie okazis la ekspozicio “Esperanto, lingvo kaj kulturo”, kiu montris panelojn kun tekstoj de Ana Manero kaj desegno de José Rodríguez.

La membro de la Akademio de Esperanto, Perla Martinelli, faris omaĝon al William Auld kun la prezento de la verko “La infana raso” kaj ankaŭ prelegis pri la virinoj en la esperanta literaturo.

Rafaela Urueña klarigis kelkajn aspektojn de la Eŭropa Unio, Maciej Jaskot parolis pri la agado de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio, Wolfgang Gunther pri Esperanto kaj ekologio, Augusto Casquero pri la ĉina eduksistemo, Luís Serrano pri Solidareco, Pedro Hernández rakontis sian propran sperton pri denaskismo.

Tre interesa estis la babilado de José Mª Salguero (Kani) pri sia sperto de instruado de esperanto en gimnazio kaj la partopreno de hispanaj lernejoj en la programo Comenius, kiu permesis komunan vojaĝon tra la tri landoj al lernantoj de Hispanio, Portugalio kaj Italio.

Miguel G. Adúriz prezentis la novan libron "Platero kaj mi" ene de la kolekto Hispana Literaturo kaj ankaŭ parolis pri la historio de la kolekto “Sferoj” eldonita de li.

Grava parto de la programo estis la projekciado de filmetoj originale aŭ tradukitaj al Esperanto, la recitalo de Eduardo Vargas (SOLO) kaj la poezia koreografio de Antonio Fabián Jiménez "La sonĝo de Endimiono" en kiu partoprenis la esperanto-klubo Aksarkio.

Dum la kongreso okazis eksterordinara kunveno de HEF kaj klarigoj de la HEF-programo por la venontaj jaroj

Multaj ĵurnaloj paperaj kaj diĝitaj kaj radio-stacioj raportis pri la kongreso (la fonto estas en ĉiuj Agencia EFE) : bone funkciis gazetara servo!

Pedro Hernández estis intervjuita de EFE kaj de Procono TV (la plej konata loka televidkanalo en Malago) en salono kie viziteblas la Ekspozicio "Esperanto, Lingvo kaj Kulturo"

## EN HISPANIO

En junio, la esperanta grupo de Gijón, **Astura Esperanta Asocio**, fariĝis centjara. La venonta numero de “Heleco” priraportos historion de la asocio. Konsultu ĉe http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

Vizito de Osmo Buller: Ene de la komerca programo de la Urbodoma Palaco pri Kongresoj de la Madrida Urbodomo, HEF ricevis inviton por organizi ontan **Universalan Kongreson en Madrido.**

La Kongreso de **Valencia Esperanto Federacio** okazis la 27an kaj 28 an de Junio, en valencia vilaĝo Cheste.

La 15an de junio je la 19,00h legis siajn poemojn **Emilio Gastón,** fama verkisto kaj esperantisto el Zaragozo. La evento okazis en la Nacia Biblioteko de Madrido kadre de la ciklo "Poetas en vivo"

Semajnfina renkontiĝo en kampadejo de **Ruidera** okazos meze de julio organizita de HEJS kaj EMAS (Manĉa Esperanto-Asocio)

Petra Smidéliusz (Hungario) estis reprezentanto de UEA en la 36ª Konferenco de la Asocio de Lingvotestistoj de Eŭropo kiu okazis en **Santiago de Compostela.** Ankaŭ partoprenis Elisabeth Amstad kaj Giorgio Silfer.

En **Majorka Universitato** okazos e-kurso, en memoro de 150a naskiĝtago de Lazaro Zamenhof, laŭ titolo "Les Llengües internacionals. Introducció a l'esperanto".

Toño del Barrio estis intervjuita de **Radio City** (Gvajakilo, Ekvadoro)

Antaŭ kelkaj numeroj oni informis pri la apero de membiografio de Otília Castellví, kaj en radiprogramo oni menciis ke ŝi kaj ŝia kunulo Linus Moulines estis esperantistoj. Toño del Barrio kontaktis la filon de la paro, nun profesoro en Munkeno, kiu aldonis kelkajn informojn. http://www.delbarrio.eu/2009/06/cuando-la-editorial-es-el-criterio.htm kaj http://www.delbarrio.eu/2009/06/kiam-la-eldonejo-estas-la-fidinda-fonto.htm

**ESPERANTA MONDO**

En 2008 **UEA** registris la plej malgrandan nombron da individuaj membroj: 5.702. LA tuta membraro tamen kreskis per 706 ĉar la aliĝintaj membroj (tiuj anoj de la landaj asocioj kiuj ne estas individuaj membroj) plimultiĝis al 12. 492.

"Cent jaroj de UEA" estas la titolo de **poŝtmarko** eldonita en Bosnio-Hercegovino en la eldonkvanto de 30 mil ekz-oj.

**Eŭropa Parlamento**: La esperanta partio ricevis en Germanio sume 11.859 voĉojn kaj en Francio 29.263. Estis reelektita Małgorzata Handzlik, kandidato de la granda pollanda partio Civitana Platformo, sed Ludmila Novak el Slovenio ne ricevis sufiĉan voĉon.

Aperis la esperanta versio de **"La Origino de la Specioj"**, de Darwin, laŭ traduko de Klivo Lendon: http://www.esperanto.be/fel/but/lib/orspe.php

**Michael Jackson** estis tiel genia ke li uzis esperanton en unu el siaj videoj. http://www.soitu.es/participacion/2009/06/29/u/tonyo_1246227341.html

La 16-an de junio okazis en la rusa urbo **Jekaterinburgo la unua pintkunveno** de Brazilo, Rusio, Hinda Unio kaj Ĉinio. Tiuj kvar landoj intencas kunlabori pli intense kaj elpaŝi kune en la monda politiko. En Jekaterinburgo, kie la ĉefa temo estis la nuna ekonomia krizo de la mondo, renkontiĝis la ŝtatestroj Dmitrij Medvedev el Rusio, Luiz Inacio Lula da Silva el Brazilo kaj Hu Jintao el Ĉinio, kaj la barata ĉefministro Manmohan Singh. Post la kunveno la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, skribis al la kvar gvidantoj, karakterizante la eventon kiel historian. "Ekonomia krizo okazigita alilande trafas viajn landojn grave, ne nur pro la nekredeblaj riskoj kaj ŝuldoj alprenitaj en Usono, sed ankaŭ pro la fakto, ke la valuto de nur unu lando rolas kiel internacia valuto", tiel li komentis la temon de la kunveno. Per tio li samtempe enkondukis proponon:

"Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sammaniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne."

"Viaj kvar landoj estas promesaj landoj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn kaj lingvajn privilegiojn, se ni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo, vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo, ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli kostan solvon."

La letero de prof. Dasgupta estis sendita al ĉiu ricevanto en ties propra lingvo. (laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 332, 2009-06-26)

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO** (ne oficiale)

EKSTERORDINARA KUNVENO EN MALAGO. "Eksterordinara" ĉar laŭ statutoj la kontoj kaj jar-memoro devas esti aprobita en "ordinara" kiel okazis en aprilo en Madrido.

La nombro da membroj de HEF malpliiĝis je 50 dum unu jaro kaj duono.

La Asembleo aprobis programon de aktivaĵoj kaj buĝeto por 2009-2010

Augusto Casquero estis nomita Komitatano A, li reprezentos al HEF en UEA.

Post la demisio de la **Prezidanto** elektita pasintjare, dum la Eksterordinara Kunsido okazinta en Malago, oni aprobis ke la vic-prezidanto **Pedro Hernández,** laŭ statutoj, okupos la Prezidantecon ĝis la fino de la mandato de la nuna estraro. Momente la estraro ne havos Vic-prezidanton.

P. Garrote faris, pere de la sekretario, proponon rilate la personojn kiuj povas uzi HEF-oficejon. Oni ne balotis pri tiu temo.

**¿UK en Madrido?** Madrido kandidatiĝos en Bjalistoko, kune kun Kopenhago, por organizi la Universalan Kongreson en 2011. Post la invito de la madrida urbodomo rekte al UEA, HEF sendis oficialan inviton (La estraro de Madrida Esperanto-Liceo ne estis informita).

La pasintan 6-an de julio la Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller, vizitis Madridon por esplori la eblecojn kaj oportunecon organizi Ukn. La vizito estis farita laŭ invito de la municipa fako taskita pri la promociado kaj organizado de kongresoj kaj internaciaj kunvenoj en la urbo. Ili instigis la madridajn esperantistojn kandidati por la organizado, kaj la vizito de Osmo havis kiel celon esplori la kondiĉojn.

Li alvenis al Madrido en la vespero de la dimanĉo, dum kiu oni gvidis lin por malgranda promeno en la centra parto de la urbo. Dum la mateno de la lundo, akompanata de la nova prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Pedro Hernández Úbeda, kaj de diversaj reprezentantoj de la urbestraro, Osmo Buller vizitis diversajn kongresejojn, kaj havis intervjuojn kun reprezentantoj de la turisma sektoro en Madrido. Post la tagmanĝo li mallonge rendevuis kun grupo de madridaj esperantistoj.

Madrido konkuras por la okazigo de la Kongreso kun la danlanda ĉefurbo Kopenhago. La finan decidon la Estraro de UEA alprenos dum la nunjara Universala Kongreso en Bjalistoko, Pollando, fine de julio.

Laŭ P. Hernández ĉiuj proponoj de helpo, eĉ minimuna, estos bonvenaj. Oni necesos deĵori dum la kongreso, traduki malgrandajn tekstojn, kaj aliaj malgrandaj tasketoj. La kunordigado de la laboroj okazos kadre de la listo "HEF Aktivado" (hefaktivado@yahoogroups.com ), kiun vi povas libere aliĝi. Tiu listo ne akceptas diskutojn, ĉar ties celo estas kunordigi organizadon de aranĝoj, ktp.

Unuafoje montrita en Malago, jam estas pretaj por pruntedoni al esperantaj grupoj la kolekton de **paneloj pri esperanto.** Temas pri 15 paneloj (1,00 x 0,70 m). Lupe Sanz jam petis lokon por la ekspozicio al diversaj Madridaj distriktoj kaj la unua okazos fine de oktobro. Interesatoj kontaktu kun HEF.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ni daŭrigos niajn konversacia-rondojn en Oktobro.

BONAN SOMERON AL ĈIUJ

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

18-25 julio. 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) Liberec en Ĉekio. http://www.tejo.org/ijk/

25-a julio ĝis 1-a aŭgusto. 94-a Universala Kongreso de Esperanto. Bialystok (Pollando). http://94uk.bialystok.pl

**17-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo**
3a ĝis la 10a Oktobro 2009 Pineda de Mar (Barcelona)
Luis Serrano Pérez. Apartat 423. ES-08200 Sabadell (Barcelona)
Telf: 93 727 50 21 luis_serrano@mixmail.com luis_serrano@ya.com
http://personales.ya.com/semajno/

**"NIA VOĈO" SERĈAS NOVAN REDAKTORON**

Lupe, kiel ŝi anoncis en la lasta Ĝenerala Kunsido de MEL, kaj post 25 jaroj kiel redaktorino de "Nia Voĉo", ne deziras daŭrigi la laboron.

Plenumi du paĝojn de la flugfolio estas facile sed oni bezonas konstantan laboron por fari ĝin monate: kolekti esperantajn novaĵojn pri Hispanio kaj eksterlande, sendi ĝin per elektronika-poŝto aŭ per normala poŝto al membroj de MEL kaj aliaj interesitoj, ktp. Ĉu iu el vi estas preta por fari ĝin?

**Radioelsendoj en Esperanto (pere de interreto)**

http://www.polskieradio.pl/eo/
http://www.radio-vatikana-esperanto.org/
http://esperanto.cri.cn/
http://esperan.to/podkasto/
www.radioverda.com
http://www.podkasto.net/

************************************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID